

La Esperantisto.

Zeitschrift für die Freunde der Esperantosprache. | Gazeto por la amikoj de la lingvo Esperanto.

Eldonata unu fojon en la monato de L. Zamenhof.

Kosto por 1/2 jaro (kune kun poŝta transsendo) 2 markoj 30 pfenigoj. (Por Rusujo — 1 rublo, por ĉiuj ceteraj landoj — 3 frankoj.) Anstataŭ mono oni povas sendi signojn de poŝto (de ĉia lando), sed en tia okazo oni devas sendi per 20% pli multe ol la kosto nominala. Anoncoj po 1 marko por 1/32 de la paĝo.

Ĉio tuŝanta la gazeton „La Esperantisto“ (kiel ekzemple leteroj, artikoloj, pago por la abonado k. c.) devas esti sendata al L. Zamenhof. (Adreso: Dr. L. Zamenhof à Varsovie, Russie.)

Oni povas aboni ankaŭ en la librejo de Heerdegen-Barbeck en Nurnbergo.

No. 6.

Nurnbergo, Junio 1891.

Jaro II.

Aleksandro Macedona.

Orienta historia legendo el V. Jabec.

Granda reĝo ekregis en Grekujo; „Aleksandro Macedona“ li estis nomata. Li venkis popolojn kaj regnojn. Kaj liaj pensoj alte leviĝis super la nubojn kaj flugadis kiel per aglajflugiloj tiel alte sub la ĉielo, ke li el tie ekvidis, ke la tero estas en la oceano, kiel ekzemple naĝanta pomo en vazo da akvo.

Unufoje Aleksandro ekvolis iri Afrikon, kie troviĝas la oro kaj kie regas virinoj, kiuj ankaŭ batalas kun siaj malamikoj.

Li kolektis siajn maljunulojn kaj ilin demandis:

„Per kia maniero oni povas veni en la landon de oro?“

„Vi ne povas transiri en tiun landon“, respondis la maljunuloj, „ĉar mallumaj montegaroj baras la vojon.“

„Unu fojon mi decidis, kaj mian vorton mi ne ŝanĝos“, kolere respondis la reĝo; „mi devas tie esti, tial donu al mi konsilon.“

„Se vi neŝanĝeble decidis iri tien“, respondis la maljunuloj, „ordonu al viaj servantoj alkonduki azenojn de Libujo, por kiuj ne ekzistas mallumo, kaj ili prenu ankaŭ tre longajn ŝnurojn kaj alligu ilian unu, finon al via palaco; veturu, ho reĝo, kun via militistaro sur la azenoj tiun lokon kaj tenu la ŝnurojn en la manoj: tiam, se vi ne trovos la deziritan lokon, vi povos per la helpo de la ŝnuroj veni returne al via reĝa palaco.“

Tio ĉi plaĉis al Aleksandro. Li prenis siajn militistojn, kiuj tenis la ŝnurojn en la manoj, kaj ili forveturis al la lando de oro, por batali kun la tie regantaj virinoj.

Kiam li alvenis al tiu lando, la virinoj eliris al li kaj sin turnis al li kun la sekvanta parolo:

„Se via honoro estas al vi kara, ne tuŝu nin; ĉar se vi nin venkos, la popoloj diros, ke nur virinojn vi venkis, kaj se vi estos venkita, oni diros ke virino vin mortigis!“

Aleksandro lasis sian paroladon pri batalo kaj petis de ili panon. La virinoj alportis al li oran tablon, sur kiu kuŝis ora pano.

„Ĉu mi satiĝos de ora pano?“ demandis Aleksandro, tion ĉi vidinte.

„Se vi deziras panon, kial vi venis al ni?“ respondis la virinoj; „ĉu en via lando mankas pano, ke vi tiel malproksime venis ĝin serĉi?“

Aleksandro ekhontis kaj eliris el la urbo, surskribinte sur videblaj lokoj la sekvantan frazon: „Mi, Aleksandro, estis malsaĝulo en la daŭro de mia tuta vivo ĝis la tempo kiam

la Afrikaj virinoj instruis al mi saĝon kaj prudenton“. Kaj li reiris kun sia militistaro al sia lando.

En la vojo li sidigis manĝeti sur la bordo de ia rivero, kaj lavetante salan fiŝon en la akvo de la rivero, li eksentis tre agrablan odoron.

„Tiu ĉi rivero sendube elvenas el la paradizo“, diris Aleksandro.

Ne longe pensante, Aleksandro ekiris laŭ tiu ĉi rivero ĝis li venis al la pordoj de ia palaco, kiu estis, kompreneble, la paradizo.

„Malfermu al mi la pordon!“ li ekkriis.

„Tio ĉi estas la pordo de la domo de Dio“, respondis al li voĉo el interne; „nur sanktuloj havas la rajton enveni tien ĉi!“

„Konfesu mian reĝan majeston“, ekkriis Aleksandro, „kaj donacu al mi ion, ĉar mi estas reĝo!“

Apenaŭ li finis siajn vortojn —, jen ia mano donas al li homan kapon, li ĝin prenis kaj reiris al sia lando.

Alveninte hejmen, li ekvolis scii la pezon de la donacita kapo, metis ĝin sur la teleron de pesilo, kaj la telero malleviĝis ĝis la tero. Sur la duan teleron li metis milojn da pecoj da arĝento kaj oro por ĝin mallevi —, sed vane: li ne povis; la tuta arĝento kun la oro ne pezis tiom, kiom la kapo.

„Kion ĝi signifas?“ demandis Aleksandro la saĝulojn.

„Ĝi estas tial“, respondis la saĝuloj, „ĉar en la kapo sin trovas homa okulo, kiu neniam satiĝas je arĝento kaj oro.“

„Kion do fari en tia okazo?“ demandis Aleksandro.

„Ŝutu iom da tera polvo sur la okulon, tiam ĝi nenion vidos kaj kompreneble nenion deziros.“

Kiam tiu ĉi konsilo estis plenumita, la telero, sur kiu kuŝis la kapo, tuj levigis rapide supren.

„Nun mi vidas“, diris Aleksandro, „ke la saĝuloj havas prudenton ne homan, sed Dian!“

Tradukis N. Kuŝnir.

„Nur unu vorton!“

Noveleto de L. E. Meier.

Estis la mateno post dancado. Tio ĉi daŭris ĝis la kvara horo; tiam ankoraŭ oni kunesidigis por trinki nigran kafon ĝis ĉirkaŭ la kvina horo. Post tio ĉi oni disiris hejmen.

Ho, kiel bela estis tiu dancado! Amuzoj ne mankis kaj, kontraŭ la ordinario, la nombro de la dancantoj estis granda; eĉ sufiĉe maljunaj sinjoroj estis enŝiritaj per la plezurego kaj alportis oferojn al la diino de la dancado. Kiam

matene oni reiradis hejmen, la plej junaj el la mondo sinjora estis la ĝentilaj akompanantoj de la sinjorinoj kaj fraŭlinoj. La maljunaj sinjoroj jam longan tempon estis dormintaj, ĉar la mateno ĉiam apartenas al la junularo.

Tiel ankaŭ Ella, la belega filino de la komerca konsilano Balding, feliĉe venis al la pordo de la gepatra loĝejo, kaj ŝi estis, kune kun la patro kaj patrino, ĉirkaŭita de amaseto da junaj herooj de danco. Oni ŝercadis kaj ridadis dum la irado; la komerca konsilano estis escepte gajeta, kaj la patrino havis sian „bonan tagon“

La disiĝado iom longiĝis: ĉiu el la sinjoretoj penis diri ion escepte agrablan, kaj ĉiu el ili pensis, ke li ricevis de Ella premon de mano aparte signifan, — ĉiu kredis, ke li estas sole preferita.

Ĉu ĉiuj?

La plej poste tie restis unu juna sinjoro, kiu atendis ĝis ĉiuj antaŭirintoj ricevos sian „maneton“; tiam ankaŭ li mem povus diri adiaŭ al Ella.

Tio estis la doktoro Gering, juna juĝisto. Li estis escepte trankvila kaj modesta. „Trankvilaj akvoj estas profundaj“, diras proverbo germana, kaj modesteco ofte kaŝas firman certecon.

Kiam la lasta antaŭstaranto diris adiaŭ — la konsilano kun lia edzino jam staris en la nefermita pordo, kaj post ili servanto kun brulanta kandelo — Gering iris antaŭen, por komenci sian preparitan parolon de adiaŭ. Sed en la minuto, kiam li levis la manon por saluti Ella'n, tiu ĉi sin turnis al la amaseto de la deirintaj sinjoroj:

„Vi ne forgesu do, kion Vi promesis sinjoro de Stetten!“

Kaj de tie voko eksonis:

„Certe ne, mia fraŭlino, „mi ne bezonas ja pli ol unu vorton!“

„Ella, nun venu do!“ eksonis voko de en la pordo, kaj la sinjorino konsilanedzino jam preninte la veston de sia filino altiris tiun ĉi en la domon.

„Bonan nokton!“ ankoraŭ ekkriis Ella. „Bonan nokton!“ resonigis la amaseto. Gering ankoraŭ staris kun levita mano — Ella jam eniris en la domon, la pordo fermiĝis — jen li staris sen „maneto“ kaj sen adiaŭdiro, kaj la parolo restis neparolita!

Trankvile kaj modeste Gering reiris en sian loĝejon.

Li iris tre meditante kaj tre malrapide. Ĉiuj aliaj jam de longa tempo estis foririntaj.

Veninte en sian loĝejon, li fine memoriĝis je si mem. Li ekĝemis kaj parolis al si mem, kiel post la el dono de ia juĝo mortiga:

„Nur unu vorton — nur unu vorton se ŝi dirus al mi!“ La juĝisto Gering ankoraŭ la duan fojon ekĝemis kaj poste ekdormis en la veninta mateno.

Estis luma tago, kiam Ella maldormiĝinte vidis la sunon brilantan tra la kurtenoj de la ĉambro.

Ŝi pripensis la faritaĵojn de la tago pasinta kaj ridetis kontente. Sed jen je unu fojo ŝi malgajiĝis. Jen unu rememoro malagrabra. Ŝi memoriĝis je la disiĝo, memoriĝis je la juĝisto Gering, kiu estis la sola, kiu ne diris al ŝi eĉ unu vorton! Ĉiuj sinjoroj premis ŝian manon, ĉiuj diris ion amindan, sed li sola silentis. Li eĉ ŝajne intence restis poste!

„Mi tamen kredas, ke li estas senkulpa“, diris ŝia plej bona amikino Mathilde, kiu vizitinte Ella'n en la vespero sidis kun ŝi en la ĉambro de Ella por paroleti pri la dancado pasinta. „Vi scias, ke tro alproksimiĝi estas tute kontraŭ la karaktero de Gering — kvankam mi devas konfesi, ke tio ĉi estas eĉ stranga eĉ juĝisto; sed kiu scias, ĉu li ne estos tute alia en lia juĝa servado?“

„Tro alproksimiĝi! respondis Ella. Inter tro alproksimiĝi kaj intence retiriĝi estas ja granda diferenco!“

„Certe! Sed...“

„Kio povas lin fari tia? Certe li bone scias, ke mi lin amas. Ĉu mi ne kun li dancis la unuan valson? Ĉu ne li sidis kune kun mi eĉ la vespermanĝo? Kion pli mi povus fari. Ĉu mi mem devas alforĝi lin per ia aparta atento? Ĉu eĉ ne estas lia propra afero diri... kio devos estis dirita? Ho! tia modesteco! Nur unu vorton li bezonas diri, kaj tiam ĉio estos farita. Sed neniel li diras tiun vorton!“

„Kara mia Ella! Ne ĉiuj homoj havas egalan karakteron! Ofte en ia viro oni trovas ian econ, kiu konvenus multe pli bone al virino. Diru mem: kio hodiaŭ pli multe devigas la virinojn plendi: la modesteco aŭ la tro granda proksimiĝado de la sinjora mondo? Certe! Gering estas escepto el la regulo, kaj tio ĉi distingas lin!“

„Kaj kiel fine ni venos al la celo? mi ne povas rekte diri la vorton liberigantan, kaj li mem — estas tro modesta!“

Ella parolis iom kolere: siaj vangoj ruĝiĝis, kaj Mathilde vidis, ke la okuloj de la amikino malsekiĝis.

„Jen estas la tempo por agi“, diris Mathilde interne kaj pripensadis, kiel ŝi mem povus helpi la aferon. „Kun la tempo vi alvenos al la celo“, ŝi konsolis la amikinson. „Eble Walter iel povos helpi!“

Tiuj ĉi vortoj videble reanimis Ella'n. „Walter“, ŝi respondis, „jam promesis al mi sian helpon. Kiam ni hodiaŭ matene disiĝis, mi diris al li: „Sed ne forgesu, kion Vi promesis!“

„Kaj kion li diris?“

„Certe ne! Mi bezonas nur unu vorton!“

Walter de Stetten, oficiro husara, estis la fianĉo promesinta de Mathilde, kaj pro tio li estis ankaŭ la konfidulo de la du amikinoj. Li koniĝis kun la juĝisto, kiam ili estis kolegoj-studentoj, kaj li nun volonte akceptis la laboreton, kiun Ella al li transdonis ŝi mem kaj per sia amikino: certigi, ĉu Gering efektive amas Ella'n.

Post tagmanĝo, kiun Stetten kaj Gering kutime prenadis kune en manĝejo, la oficiro — fidela al sia principo ne longe pripensi, sed rekte aliri al la celo — komencis sen ia antaŭparolo pri Ella.

Stetten estis rekte la kontraŭaĵo de lia amiko. Dum tiu ĉi pro multa pripensado kaj granda modesteco ŝanceliĝadis frapi al la pordo de sia sanktejo, Stetten iam estis preta enbati tiun ĉi pordon.

„Kiam do estos Via fianĉigo?“ li demandis la amikon.

Gering lin miregante ekrigardis; li intencis respondi, sed ne povis.

„Sen ia ŝerco, jen estas la tempo por fine konfesi Vian intencion! La tuta urbo parolas pri Vi du kiel pri estontaj geedzoj. Nun aliru al la celo! Vi estas enamita en Ella'n — Vi mem min tion sciigis. Ŝi ankaŭ amas Vin. Tion mi scias, kaj Vi ĝin scias ankoraŭ pli bone!“

Gering lin aŭskultadis ne ferminte la buŝon.

„Ho! ne rigardu min do tiel miregante! parolu fine! — Stranga juĝisto Vi estas — al Vi mankas la parolo por defendiĝi! Ĉiam nur ian unuan vorton Vi bezonas por komenci!“

„Jes, la unuan vorton!“ diris Gering malgaje. Kial ŝi ne decidiĝas paroli?“

„Jen!“ diris nun kvazaŭ miregante Stetten, „la unuan parolon ĉiam devas diri Vi! Ĉu la fraŭlino eble devus sin turni al Vi: „Sinjoro juĝisto, mi intencas havi Vin, — ĉu Vi volas, jes aŭ ne!“

„Tion mi ne pensas, ne!“

„Kion do? — Mi Vin ne komprenas: Nun Vi du jam unu kun la dua koniĝis antaŭ kelkaj monatoj; ĉiu homo ellegas el Viaj vizaĝoj, ke Vi amas unu la duan — sed nek Vi nek ŝi decidiĝas ĝin konfesi! Vi mem ankoraŭ pli malmulte ol Ella — kvankam Vi estas viro! Mi estas tute certa, ke Vi ne ricevos rifuzon — kaj Vi mem ĝin scias pli bone ankoraŭ.“

„Mi? — Ho, se mi ĝin sciis! Vi mem diru: kian certecon mi havas por ĝi? Ĉu Ella parolis nur unu solan fojon eĉ plej malgrandan vorteton, kiu min certe esperigus? Eĉ ne unu solan vorton! Kaj mi timas esti rifuzita!“

„Grandegan estimon mi sentas por juĝisto, kiu tiel malmulte konas la pruvojn efektivajn! — Ni ne ŝercu, Herman, — la afero devas esti finita. Kian provon Vi atendas de Ella por fari Vin certa je Via feliĉo?“

„Nur unu vorton!“

„Tion saman Ella atendas de Vi!“

„Ho!“

„Mi certigas Vin per mia honoro!“

„Ej! Tiam —“

„Tiam Via sorto dependas de tiu, kiu el Vi du diros la unuan vorton? aŭ pli bone Vi ambaŭ devos diri unu vorton — tio estas tiel komprenebla, kiel unuoble unu estas unu!“

Gering restis pripensanta: jen li staras antaŭ tiu foso, kiun li devus transalti! Lia malgaja vizaĝo ridigis lian amikon. „Mi nun bone komprenas, ke mi mem devos helpi la aferon“, diris Stetten.

„Vi?“ demandis mirante Gering, kaj en tiu sama minuto la espero reanimis lian vizaĝon.

„Jes“, respondis Stetten, mi mem estos sekundanto por Vi, kaj Mathilde por Ella. Ho, la duelo estos gajega! Mi estas sciema, kiu el ni unue vundos la duan! Sed mi estas certa, ke la frapo estos sen malbona rezultato, de kiu ajn flanko ĝi venos!“

Gering ne multe esperis de la provo, sed ridetis.

Stetten sin levis kaj kune kun Gering foriris el la manĝejo.

„Mi vin sciigos pri la sekvantaĵo, estu certa!“ diris Stetten premante la manon de Gering kaj disigante kun li.

Stetten iris al sia militistejo, Gering iris al sia juĝejo. Li tiam skribis parolon defendan, kaj kiu el liaj konatoj legus la lertan parolon, kiun Gering skribis, tiu neniel kredus, ke la skribanto tiel vane serĉis nur unu vorton! —

Post kelkaj tagoj — estis la lasta semajno de la monato Majo, kaj la vetero estis plej bela — Herman Gering sidis antaŭ siaj skribaĵoj. Estis ĉirkaŭ la sepa horo de vespero, kaj la juĝisto sin preparis eliri. Tiam la skribisto de Gering venis en la ĉambron kaj donis al Gering ian leteron. Tiu ĉi letero venis de Stetten, kiu per ĝi invitis sian amikon fari kun li promonon en la morgaŭa dimanĉo. La lastaj vortoj de tiu letero estis la jenaj:

„Diru al la transdonanto nur unu vorton: „jes“ aŭ „ne“ estos sufiĉe.“

Gering komisiis la skribiston diri al la alportinto nur „Jes“, kaj li eliris el la juĝejo.

Je la mateno de la veninta dimanĉo la du amikoj kune promenis tra la kampoj en la ĉirkaŭaĵo de la urbo kaj eniris en belegan arbaron. La tago estis belega, aero kaj lumo plenaj je gajeco kaj freŝeco. Stetten mem estis aparte gaja kaj tiel li faris sian amikon Gering ankaŭ gajeta. La du amikoj iradis, parolante pri diversaj objektoj.

Stetten parolis pri multaj objektoj, sed ne tuŝis eĉ per unu vorto la aferon de kelkaj tagoj antaŭe.

„Stranga ĝi estas“, interne pensis Gering; „li do komencu!“

Gering de tempo al tempo penis igi la amikon tuŝi la aferon, sed Stetten ŝajnis ne kompreni kaj intence parolis pri aliaj objektoj.

Tiel ili ambaŭ fine venis al loko, kie la arbaro estis iom travidebla. Preterirante Gering rimarkis ne malproksime antaŭ ili du sinjorinojn, kiuj nerapide iradis antaŭen. Li ne povis ilin rekoni, sed io nekonata faris pli rapide bati lian koron.

Stetten ne diris eĉ unu vorton, ŝajnis ke li ne vidas la virinojn. Gering intence silentis. Post kelkaj paŝoj la sin-

jorinoj ne estis pli videblaj. La parolado estis finita, kaj Gering meditante iradis sur la nelarĝa vojo post sia amiko, kiu disŝovante ie kaj ie la branĉojn nelaŭte kantadis la kanton de Heine: „Mi ne scias, kion signifas . . .“

Fine Gering rekomencis paroli:

„Tie ĉi estas pli kaj pli interese. Ni iras tra efektiva densaĵo antaŭmonda!“

„Jes“, respondis Stetten, „estos ankoraŭ pli interese, kiam fine la arbaro finiĝos. Estis beleta vojo, certe!“

La arbaro iom post iom maldensiĝis, kaj kiam Stetten disŝovis la lastajn branĉojn, montriĝis herba loko ĉirkaŭita de la arbaro, kaj en la fino de tiu loko estis bela dometo arbarista.

„Ĉu tie ĉi ne estas belege?“ demandis Stetten.

„Belege, certe!“ respondis Gering; sed Stetten aldonis:

„Mi diras al Vi, amiko, ni trovos ankoraŭ ion pli belegan!“

„Kion do li intencas?“ sin demandis Gering.

La du amikoj aliris al la dometo. En la mezo de la vojo Stetten sin turnis al la dekstra flanko.

„Ni eniros en la dometon per poste“, li diris. Ili tiel ĉirkaŭiris la dometon tra la arbaro kaj proksimiĝis al ĝardeno. Stetten estis kelkan pecon pli antaŭe.

Jen du sinjorinoj elirintaj el la pordo alvenis al la du amikoj.

„Ho!“ kontraŭvole ekkriis Gering, ĉar li rekonis la samajn du virinojn, kiujn li antaŭe vidis en la arbaro.

Kiam la du sinjorinoj eliris el la ĝardeno, Stetten rapide alproksimiĝis al ili, salutinte ilin ĝentile.

Ĝi estis Mathilde kun Ella.

Stetten mallaŭte diris al Ella kelkajn vortojn, kaj tiam tiu ĉi rugiĝis. „Certe!“ diris Stetten laŭte, „demandu do lin Vi mem!“ Gering dume alvenis. Antaŭ ol li povis saluti la sinjorinojn, Ella alpaŝis al li kaj diris:

„Ĉu tio estas efektive vera, kions-ro de Stetten min sciigos?“

„Jes aŭ ne!“ rapide ekkriis Stetten al Gering. „Nur unu vorton — jes aŭ ne!“ Kaj li rigardis sian amikon kiel sciante, ke tiu ĉi ne povus respondi ion alian ekster „jes“.

La rigardo de Ella nun ekbrilis. Ĝi estis tia rigardo, ke Gering ĝin sentis en sia koro — tiel magnete Ella nenie ankoraŭ lin rigardis! Ŝi atendis la respondon; ŝajnis al li ke li vidas kaj sentas, ke ŝi atendas nur la unu vorton: „jes“. Kaj tamen li ne sciis, pri kio propre ŝi lin demandas. Sed en la demando estis io, kion li komprenis tre bone; ŝi ĝin elparolis per sia malseka rigardo; ŝia brusto sin levadis kaj mallevadis, kaj jen ŝia mano estis donita al li.

„Ĉu estas vere, Herman?“ ekparolis ŝi nun tiel karese kaj plene je amo, ke Gering tute forgesis la ĉirkaŭaĵon. Li vidis pli nenion ekster ŝi, li aŭdis nur ŝian voĉon; la tuta mondo ŝajnis foresti. Li nun sentis feliĉon, tiu ĉi sento lin venkis, li prenis ŝian manon. Tiel varme kiel nenie ankoraŭ li ekparolis al ŝi, li respondis:

„Jes, Ella, jes!“

Kaj la du amantoj sin ĉirkaŭprenis. „Jen!“ ekkriis Stetten. „Ĉu mi ne plenumis mian promeson? Mi plenumis eĉ pli ol tion, ĉar mi promesis nur unu vorton, sed Gering nun elparolis eĉ tri vortojn!“

Kiam la sekvantan tagon Stetten venis en la loĝejon de sia amiko, li mirante lin vidis vestitan en nigra surtuto kun kravato kaj gantoj blankaj.

Stetten ne bezonis longe demandi.

„Ĉu Vi iras al la komerca konsilano Balding?“

„Jes“

„Kaj kion Vi respondos, kiam tiu ĉi Vin demandos: „sinjoro juĝisto, kion Vi deziras?““

„Nur unu vorton, Stetten!“

„Kaj tiu ĉi vorto estos?“

„Ella'n!“

La turo Babilona.

Kial Vi, patroj, en Babilono
Konstrui turon komencis
Kaj tre fiere ankaŭ je l' trono
Ĉiela regi intencis?

Ĉu jam senfina, vasta, la tero
Al Vi ne estis sufiĉe?
Vi ja trankvile kaj sen danĝero
Ĉirkaŭe vivis feliĉe.

Kien sin turnis Viaj okuloj,
Havante lingvon komunan,
Trovis loĝejon Vi, antaŭuloj,
Bonegan kaj oportunan!

Jen al Vi plaĉis monto, jen valo.
Trankvila en Ŝinorujo, —
Ĉie potenco Via egala
Kaj ĉie Via patrujo.

Kial do Vi deziris subite
De l' val' suriri ĉielon?
Vi per argilo, brikoj, malsprite
Atingi pensis la celon?

Sed entrepreno Via, ho, vana,
Senfrukta restis je l' fino;
Tuj ĝin detruis Dia la mano,
Kondukis Vin al ruino.

Dum la konstruon Vi diligente
Plialten levi rapidis,
Jen Vian lingvon Dio momente
Je lingvoj mil disdividis!

Nun jam pri kio unu parolas,
Komprenas dua nenion,
Kaj ne sciante, kion li volas,
Al li venigas alion:

Unu por l' alta granda konstruo
Necese brikon bezonas, —
Ne komprenante lin, jen la dua
Argilon tuj al li donas.

Tuj malkonsento, poste batalo
Fariĝis inter la rondo;
Tuta l' homar' disiĝis de l' valo
Diversajn landojn de l' mondo.

Kvankam jam pasis miloj da jaroj
De tiu puno de Dio, —
Regas ankoraŭ inter homaroj
Malamo, senharmonio.

Vere la patroj kontraŭ la Dio
Multege tiam fieris;
Kial ĝis nun por peko ilia
Senkulpaj l' idoj suferis?

Sed ni esperas baldaŭ refondon
De l' lingvo ĉiunacia,
Kiel konsolis tutan la mondon
Jam la profet' Zefania.

Ĝoje l' espero nin jam karesas,
Proksiman celon montrante;
L' internacia lingvo progresas,
Amikojn ĉie trovante.

Novajn amikojn voku, amikoj,
La voko vana ne estos!
Floras jam flor', ne sole radikoj,
Je l' frukto baldaŭ ni festos.

Mozes Goldberg.

L' amo de l' vivo.

De la naskiĝo ĝis la morto
La homon ĉie sur la voj'
De l' vivo trovas larma sorto,
Pli da mizero ol da ĝoj';
Sed amas ĉiu vivon teran,
Por ĝojoj tute senesperan.

Malriĉa pensas pri la pano;
Por li la vivo — nur sufer',
Lin akompanas nur malsano,
Laboro, larmoj, malesper'.
Sed amas li la vivon teran,
Por ĝojoj tute senesperan.

Insultas unu tutan mondon;
La dua plendas je l' edzin';
Malbenas tria sian rondon,
Kien la sorto ĵetis lin.
Sed amas ili vivon teran,
Por ĝojoj tute senesperan.

Tre ofte en la vivo estas,
Ke eksriĉuloj de diboĉ'
Sen pec' da pano fine restas, —
Sur vivon falas la riproĉ'.
Sed amas ili vivon teran,
Por ĝojoj tute senesperan.

Instruituloj predikadas
Pri la dolĉaĵoj de l' ĉiel',
Ke vivo nin nur kondukadas
Al morta, sed feliĉa cel'.
Sed amas ĉiu vivon teran
Por ĝojoj tute senesperan.

Pro l' aĝo ĝemas maljunulo:
Mortetis sentoj, dormas kor',
Finita estas la kalkulo
Kun vivo. Restas nur dolor'.
Sed amas li la vivon teran,
Por ĝojoj tute senesperan.

Malkontenteco vivas ĉie
Inter la homoj de la mond';
Eterne tie ĉi aŭ tie
Verŝadas sin la larma oŭd'.
Sed amas homoj vivon teran,
Por ĝojoj tute senesperan.

S. B...skij.

Pri la nomaro de l' verkoj.

En nia literaturo devas esti severa ordo; tial ni ĉiun novan verkon signas per difinita konstanta numero, kiun ĝi devas ĉiam havi tiun saman en ĉiuj nomaroj de verkoj de nia literaturo. Dank' al tio, parolante pri ia verko, ni estas liberigitaj nomi ĝian plenan titolon kaj povas ĉiam nomi nur ĝian numeron. Sed ordinare la aŭtoroj, presante novan verkon, donas al ĝi numeron laŭ sia propra bontrovo, kaj de tio

elvenas, ke sub unu sama numero en unu nomaro estas presita unu verko, en alia — alia. Por forigi la malordon kaj malkompreniĝojn, kiuj ofte elvenas de tio ĉi, ni petas ĉiujn eldonantojn de verkoj, ke, presante la nomaron de verkoj, ili ĉiam presu ilin nur en tiu ordo, en kiu ili estas presataj sur la lasta paĝo de nia gazeto. Se ili volas enpreni en sian nomaron ian verkon, kiu en la „Esperantisto“ ne ricevis ankoraŭ difinitan konstantan numeron, ili devas presi la nomon de tiu ĉi verko tute sen numero (sur la loko de la numero ili povas doni simplan strekon). Aparte arbitrajn numerojn ricevis la laste elirintaj verkoj, komencante de No. 41; tial, por enkonduki konstantan ordon, ni nun ŝanĝis la numerojn de kelkaj el la lastaj verkoj, kaj sur la lasta paĝo de la nuna numero de nia gazeto ni jam donas la konstantan ordon, en kiuj la verkoj devas esti kalkulataj. En ĉiuj eldonotaj nomaroj de verkoj la eldonantoj de nun estas petataj doni ĉiun verkon aŭ sub ĝia konstanta, difinita numero, aŭ tute sen numero.

Nomaro de la personoj, kiuj en tiu ĉi jaro abonis la „Esperantiston“ rekte de L. Zamenhof.

(Rimarko. El niaj amikoj ekster Rusujo granda parto abonis la gazeton per diversaj librejoj, kaj tial ni ne scias ilian nomon kaj adreson kaj ni ne povas ĝin presi; la mal-supre donita nomaro enhavas nur tiujn personojn, kiuj abonis rekte de ni. — La adresoj estas presitaj nur apud la abonantoj novaj, aŭ apud tiuj, kiuj en la lasta tempo ŝanĝis sian adreson; la adresojn de ĉiuj ceteraj abonantoj oni povas trovi en la nomaro de abonantoj de 1890. — Steleto [*] antaŭ la nomo signifas, ke la montritaj abonantoj pagis nur por duono de la jaro 1891 kaj ili estas petataj alsendi la mankantan parton de la abona pago.)

*Abolenski V., doktoro; Afonasjev, fabrika tovar. Voznesenskoj manufakturi, Ivanovo-Voznesensk; Archangielskaja Olga; *Baĵenov, studento de l' universitato, Kiev; de Beaufront L., instruisto, ĉe la grafo de Lavallière, St. Sulpice, Tarn, Francujo; *Bejul P. J., poŝtovaja kontora, Bolgrad, gub. Besaraba; Bentkowski K., doktoro; Bogoslavski S., pastro; Borisov, fabrika P. T. Derbeneva, Ivanovo-Voznesensk; Brzozowski W. inĝeniero; *Chrzanowska Maria; Clamer S. instruisto; Delwig barono; *Dmitriev V. N. Moskovskaja ulica, dom Anosova, Saratov; *Dmochowski S., Piaski Lutarskie, Lublin; Dombrowski A. pastro; Ender F.; Ermold Herman, ĥemiisto, Frauenhoferstrasse 31/I, München; Filipov. A. G. dentisto, Saratov; Flekkel O. inĝeniero; Gelrud Emma, kvartira Ŝatunovskago, Balta, gub. Podolska; Geoghegan R., East Sound, San Juan Co., Wash. U. S. Ameriko; Goldberg M.; *Goldberg Stanislaw, Nowolipie 23, Warszawa; Grabowski A. teĥnika direktoro (2 ekzempleroj); *Griniewicz V. G., tovariŝĉ prokurora, Stavropol-Samarski; Grohn J., instruisto; *Grünfeld A., Nikolajevskaja ulica No. 116, Kiŝinev; *Guminski doktoro, Rovnoje, gub. Samara; *Gureviĉ M. S., Pokrovka, dom Butikova, Moskva; *Hall Edward, Joensuu, Finlandujo; *Hall W. R., Vasa-Nikolaistad, Finlandujo; Halle N.; Haller E.; Hübert K.; *Jachimovicz R.; Jarmochowicz J., instruisto de gimnazio, Zlatopol, gub. Kiev; Jeĉinac Serb, staba kapitano; Jezerski M.; *Jvanov D.; Jelazovski M., fabrika D. G. Burlina, Ivanovo-Voznesensk; Kahn Ludwig, Frühlingsstr. 14 a/I, München; *Kirjanov N. F., instruisto de la reala gimnazio, Samara; *Kojranski S., Enisejsk, Siberujo; *Korĉuganov F. J., p. Adr. E. J. Vinogradov, Zlatoust; *Kostelovski M., naĉalnik depo ĵeleznoj dorogi, Tjumen, Siberujo; Krasilnikov N.; Kravtsov V. L., stab-rotmistr, Boguĉar gub. Voroneĵ; Kriechbaum Friedr., stud. teĥnol., Herzog-Wilhelmstrasse 24/I, München; Kuŝnir N., Lewis N.; Lojko J.; Malkov S., kontoraŭ pravlenia V. F.

Demidova, Viazniki, gub. Vladimir; Manjkovskaja E., instruistino; Marhan Franz, Chemiker, por la klubo Esperantista, Schalke, Westfalen; Meier L. E., eksa kapitano, instruisto, Augustenstrasse 89/III, München; Meise A., poŝtestro; Milovidova N.; Mitrofanov N., Gostini dvor No. 27, Tzarskoje Selo; Müller Franz, kand. arĥeol., Barerstrasse 70/0, München; *Muravjev A. A., upravl. Kozlovo-Sarat. jel. dorogi, Saratov; *Najmanowicz H., ĵurnalisto, Twarda 25, Warszawa; *Nameda K., student akademii, Kiev; Naumann A.; *Nefedov E.; *Neŝĉadimenko, student universiteta, Kiev; Nikolskaja A. V., ĵenskaja progimnazia, Ustjuĵna, gub. Novgorod; *Nonjava A., student universiteta, Tomsk, Siberujo; Nordensvan M., telegrafestro; *Orjeĥov J. S., studento, stanitza Koĉetovskaja, ĥutor Jeŝĉeulovski, stancia Krimskaja, Donskoj, oblasti; Phillips H.; Pogorilko P., student akademii, Kiev; *Popov M. F., Balakovo, gub. Samara; *Popov X.; Portnov J. A., Kamiŝin, gub. Saratov; Portnov K. C., Bikovo, gub. Astrahan; Priggert H., inĝeniero; Prozorkiewicz C. M., komandir 2oj batarei 40 artiller. brigadi, Saratov; Puĉkovski J.; *Pudavov B. M. ĥorunĵij 6go donsk. kaz. polka, Mlava, gub. Plock; Radĉenko S. K., doktoro, Konstantinograd, gub. Poltava; Reiner A., instruisto de gimnazio; *Remele F., instruisto; Resch, instruisto, Rovnoje, gub. Samara; Rijkov V., Romanski G. A., Njeĵinskaja ulica, dom Alimonda No. 22, Odessa; Rjabinin G., Novosumskaja 24, Charkov; Rusakov S. V., notario, Murom, Rybkina E.; Rybkina W., Remenniki, dom Petrovskago, Vladimir; Silbernik J., 251 E. 31 street, New-York, Ameriko; Sirotin A., kapitano; *Slaboszewicz A., inĝeniero, staba kapitano; *Smirnov G., subleŭtenanto; Societo Esperantistoja München (p. adr. L. E. Meier); *Sokov M. J.; Spiridonov N. J., ujezdnaĵa zemskaja uprava, Petrovsk, gub. Saratov; Stern W., c/o Messrs. Horsfall et Bickham, Pendleton, Manchester, Anglujo; Strebkov A. K., Nadeĵdinskaja 54, kv. 3., S. Peterburgo; Suckerow L., apotekisto; Ŝatunovski G., advokato; Ŝatunovski S. O., Volĉinec, ĉe Briĉani, gub. Bessaraba; Terentjev V., Kuzneĉni pereulok No. 21, kv. 6, S. Peterburgo; Torkar Andreas, Bergbaubeamter in Sinjako, l. p. Varcaevakuf, Bosnien; Trompeter W.; Tŝeckmarev, kapitano; Tugarinov J., zavod Lepsĉinskiĥ, Ivanovo-Voznesensk; *Tyczynin N. V., Podol, Aleksandrovskaĵa ulica No. 75, Kiev; *Uchalav V.; Utjamiŝev A.; Vogau Sofia, Rovnoje, gub. Samara; de Wahl E.; Wiens Heinrich, Kronsgarten tra Novo-Moskovsk, gub. Jekaterinoslav; *Zambrzycki A., Janow, gub. Siedlec; v. Zeddelmann R., direktoro de progimnazio; Zimmermann J., doktoro, Kazalinsk, prov. Syr Darĵa; Zinovjev A.; Zoroastrov K. A., Savinka, tra Novouzensk, gub. Samara. Al tiu ĉi nomaro devas ankoraŭ esti aldonitaj la nomoj de 13 abonantoj, por kiuj oni pagis al ni la abonon por la tuta jaro, sed kiujn oni petis nin ne presi en la nomaro.

La batalo de l' vivo.

Rakonto de Charles Dickens.

(Daŭrigo.)

„Sed mi per alia vivo tion ĉi baldaŭ ree ŝparos.“

„Mi pensas, ke estos pli bone, se ni ĝin ne aŭskultados, sinjoro Craggs?“ diris Snithey kaj rigardis sian kompanianon.

„Mi ankaŭ pensas“, diris Craggs. Sed ambaŭ atente aŭskultadis.

„Vi ne devas tion ĉi aŭskulti“, respondis ilia kliento. „Mi ĝin tamen rakontos. Mi ne intencas demandi la doktoron, ĉu li konsentas, ĉar li ja ne donus ŝin al mi. Sed mi volas fari al la doktoro nenion malbonan, ĉar (ekster tio, ke tiaj bagateloj ne estas aferoj seriozaj, kiel li diras) mi lian infanon, mian Marion'on, volas liberigi de io, la proksimiĝadon de kio ŝi — kiel mi scias — vidas kun timo kaj doloro; mi parolas

pri la reveno de ŝia amanto. Se io en la mondo estas vera, ĝi estos tio, ke ŝi lian revenon timas. Tiom neniu estas malvastigata en siaj rajtoj. Vere, mi nun vivas kiel ĉasata hundo, mi nur en mallumo kuraĝas eliri kaj ne estas permesita al mi veni en mian domon kaj en mian propran posedojn; sed tiu ĉi domo kaj tiu ĉi posedo iam denove apartenos al mi, kiel Vi scias kaj diras; kaj Marion kiel mia virino estos post dek jaroj — Vi diras ĝin mem, kaj Vi ne estas sangvina — kredeble pli riĉa, ol se ŝi ligiĝos kun Alfred Heathfield, kies revenon ŝi atendas kun timo (ne forgesu tion ĉi) kaj kies amo — kaj ankaŭ nenia amo en la mondo — ne povas esti pli varmega, ol la mia. Al kiu nun estas farata tro multe? Ĉio estas farata laŭ rajto kaj justeco. Mia afero estas tiel justa, kiel lia, se ŝi decidus favore por mi; kaj mi lasos la aferon al ŝia decido. Estos al Vi agrable ne pli aŭdi pri tiu ĉi afero, kaj mi ankaŭ pli Vin per tio ĉi ne embarasos. Vi konas nun miajn intencojn kaj miajn bezonojn. Kiam mi devas forlasi Anglujojn? —

„Post unu semajno“, diris Snitchey. „Sinjoro Craggs? —“

„Ankoraŭ iom pli frue, mi konsilus“, respondis Craggs.

„Post unu monato“, diris la kliento, observinte la ambaŭ vizaĝojn. „De hodiaŭ post monato mi forveturos.“

„Ĝi estas tro longa tempo“, diris Snitchey; „tro longe. Sed ĝi tiel restu. Mi pensis, ke li postulos por si tri monatojn“, murmuris li al si mem. „Ĉu Vi volas foriri? Bonan nokton, sinjoro!“

„Bonan nokton!“ respondis la kliento kaj skuis al ambaŭ la manon. „Vi vidos ankoraŭ, kiel bone mi scias uzi mian riĉecon. De nun Marion estas mia stelo de feliĉo!“

„Gardu Vin sur la ŝtuparo, sinjoro!“ diris Snitchey; „ĉar tie la stelo ne lumas. Bonan nokton!“

„Bonan nokton!“ respondis sinjoro Warden.

La ambaŭ kompanianoj eliris sur la ŝtuparon kaj lumis al li; kiam li jam estis foririnta, ili ankoraŭ staris kaj rigardadis sin reciproke.

„Kion Vi diras al tio ĉi, sinjoro Craggs?“ diris Snitchey. Sinjoro Craggs balancis la kapon.

„Ni opiniis en la tago, kiam havis lokon tiu transdono, ke en la maniero, kiel la paro diris al si adiaŭ, estis io stranga, tion ĉi mi memoras“, diris Snitchey.

„Jes, jes“, diris sinjoro Craggs.

„Eble li trompiĝas“, daŭrigis sinjoro Snitchey, ŝlosante la fajreltenan keston kaj metante ĝin sur ĝian ordinaran lokon; „sed se tiel ne estas, iom da facilanime kaj malfideleco ankaŭ ne estus mirindaĵo, sinjoro Craggs. Kaj tamen mi opiniis la belan vizaĝeton tre fidela. Ŝajnis al mi“, diris Snitchey, surmetante sur sin sian superveston kaj la gantojn (estis tre malvarme ekstere) kaj korektante kandelon, „kvazaŭ ŝia karaktero en la lasta tempo fariĝis pli forta kaj pli serioza, pli ol la karaktero de ŝia fratino.“

„Sinjorino Craggs havis tiun saman opinion“, rimarkis Craggs.

„Mi efektive ion donus“, diris Snitchey, kiu en vero estis tre bonkora, „se mi povus kredi, ke sinjoro Warden trompiĝis en sia kalkulo; sed kiel ajn facilanima kaj nekonsanta li estas, li tamen konas la mondon kaj la homojn (kaj estus malbone, se estus alie, ĉar por sia konado li pagis sufiĉe kare); kaj mi ne povas al mi prezenti, ke ĝi estas kredebla. Ni faros la plej bone, se ni nin ne enmiksos; ni povas fari nenion pli, sinjoro Craggs, ol silenti.“

„Nenion pli“, respondis Craggs.

„Nia bona amiko, la doktoro, rigardas tiajn aferojn indiferente“, diris Snitchey balancante la kapon. „Mi almenaŭ volus esperi, ke li ne bezonos sian filozofion. Nia amiko Alfred parolas pri la batalo de l'vivo, — li denove balancis la kapon, — mi esperas almenaŭ, ke li ne falos en la komenco de la batalo. Ĉu Vi havas Vian ĉapelon, sinjoro Craggs? mi estingos la duan kandelon.“

Ricevinte jesan respondon de sinjoro Craggs, sinjoro Snitchey faris, kiel li diris, kaj palpante ili eliris el la ĉambro de interparoloj, kiu nun estis tiel malluma, kiel la objekto de ilia parolado, aŭ kiel la advokataĵo entute.

Mia historio kondukas min nun en malgrandan malbruan ĉambron de instruitulo, kie en tiu sama vespero la fratinoj kaj la freŝa maljuna doktoro sidis antaŭ la agrabla kameno. Grace kudris, Marion legis el libro. La doktoro en nokta surtuto kaj pantofloj, tenante la piedojn sur la varma tapiŝo, sidis en la ava seĝo, aŭskultis la legantinojn kaj rigardadis siajn filinojn.

Ili estis tre belaj. Du pli agrablaj vizaĝoj neniam ankoraŭ faris angulon kamenan ĉarma kaj sankta. Ion de ilia malegaleco la forpasintaj tri jaroj devisis; kaj sur la pura frunto de la pli juna fratino, en ŝia okulo kaj en la tono de ŝia voĉo oni povis rimarki tiun saman seriozan korecon, kiun ĉe ŝia pli maljuna fratino la senpatrine travivita juneco jam longe maturigis. Tamen ĉiam ankoraŭ ŝi ŝajnis pli ĉarma kaj pli malforĉta ol la dua; ĉiam ankoraŭ ŝi ŝajnis metadi sian kapon sur la bruston de sia fratino, fidadi je ŝi kaj serĉadi konsilon kaj helpon en ŝiaj okuloj, en tiuj ĉi koraj okuloj, tiel trankvilaj, tiel klaraj kaj tiel afablaj kiel antaŭe.

„Kaj kiam ŝi nun estis en la patra domo“, legis Marion el la libro, „kiu estis al ŝi tiel kara pro ĉiuj tiuj rememoroj, ŝi komencis sentadi, ke la malfacila tento de ŝia koro baldaŭ devas veni kaj ne estas prokrastebla. Ho, patra domo, nia konsolanto kaj amiko, kiam ĉiuj aliaj nin forlasis, de kiu la disiĝo ĉe ĉiu paŝo inter la lulilo kaj la tombo —“

„Kara Marion!“ diris Grace.

„Mia museto!“ ekkriis la patro, „kio estas al vi?“

Ŝi prenis la manon, kiun la fratino donis al ŝi, kaj legis plu; sed per voĉo ĉiam ankoraŭ tremanta, kvankam ŝi penis kovri sian ekseiton.

„De kiu la disiĝo ĉe ĉiu paŝo inter la lulilo kaj la tombo estas ĉiam dolora. Ho, patra domo, vi, ĉiam fidela kaj tamen tiel ofte malsatata, estu malsevera kontraŭ tiuj, kiuj deturnas sin de vi, kaj ne persekutu iliajn erarantajn paŝojn per tro maldolĉa pento! Ne permesu, ke ia afabla rigardo, ia rideto el malnova tempo brilu sur via vizaĝo de spirito. Nenia radio de amo, boneco, malsevereco, koreco lumu de via blanka kapo. Nenia rememoro de ama vorto aŭ rigardo eliru plendante kontraŭ tiu, kiu vin forlasis, sed se via rigardo povas esti punanta kaj severa, tiam tiel rigardu en via kompatemeco la pentantojn!“

(Daŭrigo venos.)

Korespondoj.

St. Peterburgo, Bolsaja Konjuŝennaja No. 8,
13/25 Aprilo 1891.

Alte estimata Sinjoro! Mi permesas al mi sendi al Vi apud tiu ĉi letero mian promeson ellerni la lingvon Esperanto, kaj mi raportas al Vi, ke mi skribis la unuan leteron en la lingvo Esperanto al unu sinjoro sur la insulo Madagaskaro; tiun sinjoron mi ne konis, sed li jam tuj respondis al mi en tiu sama lingvo.

Via humila servanto

Štirnbach.

Novajoj.

Por la celoj de nia afero ni ricevis de sinjoro E. Haller el Rostov Dona 2 r. 55 kop. La monon ni uzis en tia maniero, ke ni sendis al s-ro Haller 35 ekzemplerojn de la poŝa lernolibro, petante lin disdoni ilin al diversaj personoj en Rostov.

* * *

Nomaro de la personoj, kiuj, aparte aŭ inter aliaj verkoj, venigas en la lasta monato lernolibrojn (ne malpli ol 10) aŭ vortaretojn (ne malpli ol 100): inĝeniero V. Brzozowski el Murom — 50/41; s-ro G. Romanski el Odoso — 47/1+3/41; s-ro J. Seleznjov el Melekes — 25/41; s-ro A. Martakov el Obojan — 25/41; s-ro K. Portnov el Bikovo — 25/41; s-ro N. Halle el St. Peterburgo — 2/1+8/4+1/5+1/13+4/15+1/22+1/23+6/24+1/29+1/33+1/34+1/35+1/36+1/39+35/41+3/45+1/47; s-ro K. Hübert el Aleksandrovska — 25/41.

En la lasta monato la sekvantaj gazetoj parolis pri nia afero: „Pskovskij Gorodskoj Listok“ No. 28 (traduko de la „Deveno de la virino“ el la Esperantisto kun rimarko pri nia lingvo); „Ueber Land und Meer“ No. 27 (pri la klubo Esperantista en Munĥeno); „Novoje Vremja“ No. 5444 (pri la vastigado de nia lingvo en diversaj landoj kaj pri la klubo Esperantista en Upsala); „Odesskij Vjestnik“ (8/IV?) (traduko de la „Deveno de la virino“ el la Esperantisto kun rimarko pri nia lingvo); „Zar“ (en Bohemujo) No. 2 kaj 3 (artikolo de s-ro Fr. Vl. Lorenc pri nia lingvo kun la plena gramatiko kaj kun multaj ekzercoj); „Deutschland“ No. 161 (artikolo enhavanta la paroladon de s-ro Chr. Schmidt en la societo de germanaj komercistoj en Nurnbergo); „General-Anzeiger von und für Deutschland“ (de 21/IV?) (tio sama kio en „Deutschland“ No. 161); „Würzburger Journal“ (de 21/IV?) (tio sama kio en „Deutschland“ No. 161); „General-Anzeiger von der Stadt Fürth“ (de 4/IV?) (el la parolado de s-ro Chr. Schmidt en Fürth, gramatiko de nia lingvo kun ekzercoj); „Frankfurter Zeitung“ (No. ?) (pri la parolado de s-ro Schmidt en Nurnbergo, pri la progresado de nia lingvo en diversaj landoj, pri la klubo en Upsala k. t. p.); „Novoje Vremja“ No. 5450 (pri la vastigado de nia lingvo, pri ĝia literaturo, pri la traduko de la dramo de la Granda Princo K. R., pri la rondeto en Moskvo kaj la rusa nacia himno, pri la publikaj legadoj en la eksterlando k. t. p.); „Odesskij Vjestnik“ de 10/22 V (reprezo de la artikolo de „Novoje Vremja“ No. 5450); „Odessaer Zeitung“ No. 103 (reprezo de la artikolo de „Novoje Vremja“ No. 5450); „Il Paese“ No. 20 (artikolo pri nia lingvo kaj pri la lernolibro de Dro. Marignoni); „Schalker Zeitung“ kaj „Emscher Zeitung“ (No. ?) (pri nia lingvo); „Odesskij Listok“ No. 117 (reprezo el „Novoje Vremja“ No. 5444); „Denj“ de 26/V (anonco de s-ro Martakov el Obojan pri lia senpaga instruado de nia lingvo). — Al sinjoroj Lojko, Rijkov, Zinovjev, Brzozowski, Ŝatunovski, Lorenc, Schmidt, Ŝmurlo, S. Goldberg, Hübert, Marignoni kaj Trompeter, kiuj sendis al ni la gazetojn aŭ sciigojn pri ili, ni esprimas nian koran dankon.

La 10/22 an de Aprilo inĝeniero V. Brzozowski havis publikan paroladon pri nia lingvo en la Muzika-drama Societo en Murom. La parolado tre plaĉis al la aŭskultantoj kaj havis bonan sukceson. Multaj ekinteresis sin je nia lingvo kaj komencis ĝin lerni. En Murom formiĝis rondeto de Esperantistoj. Ilia unua faro estis tio, ke ili kolektis kelkan sumon da mono kaj decidis presi por tiu ĉi mono la publikan paroladon de s-ro B. kaj dissendi ĝin al la redakcioj de ĉiuj rusaj gazetoj. La parolado estas jam sendita en la censurejon kaj ĝi estos kredeble preta kaj dissendita en Julio.

Antaŭ kelka tempo sinjoro Chr. Schmidt havis publikan paroladon pri nia afero en la Societo de germanaj komercistoj en Nurnbergo. La parolanto rakontis pri la esenco kaj konstruo de nia lingvo kaj pri ĝia vastigado en diversaj landoj. La esenca enhavo de la parolado en pli aŭ

malpli longa formo estas represita de diversaj germanaj gazetoj, el kiuj ni bedaŭrinde ricevis nur malmultajn.

Ni ricevis la unuan numeron de la gazeto „Espero“, kiun sinjoro M. S. Bogdanov en Sofia (Bulgarujo) intencas eldonadi ĉiumonate en la lingvoj Esperanto kaj bulgara. Tion ĉi ni sciigas al ĉiuj amikoj, kiuj jam kelkajn fojojn demandis nin, kio fariĝis kun la gazeto „Espero“, kies unua numero jam longe devis eliri. Ni deziras al la gazeto plenan sukceson, ni esperas, ke la redaktoro havos sufiĉe da energio por akurate eldonadi la gazeton malgraŭ la grandaj malfacilaĵoj kaj la grandaj materialaj perdoj, aparte en la unua tempo. Sed kun pli detala preparolado ni nin detenas ankoraŭ ĝis la tempo, kiam ni vidos, ke la gazeto efektive eliras regule.

Sinjoro J. Puĉkovski el Kjaŭta skribas al ni, ke li venis al la konvinko, ke plena vortaro internacia — rusa ne estas ankoraŭ forte neĉesa, kaj li demandis nin, ĉu ni konsilas al li komenci la presadon de la plena vortaro aŭ pli bone la monon, kiun li volis enmeti en la presadon de tiu vortaro, uzi por nia afero en alia pli utila maniero. La opinion de sinjoro P. ni tute dividas (tiom pli, ke baldaŭ kredeble eliros plena radikvortaro internacia-rusa (analoge je la germana vortaro No. 21), kiu kostos multe malpli kaj tamen estos tute sufiĉa; preparis ĝin sinjoro S. Ŝatunovski el Volĉinec, kaj li skribas al ni, ke li baldaŭ ĝin presos); tial ni montris al s-ro P. alian, en la nuna tempo multe pli utilan, manieron por la uzado de la mono, kiun li difinis por la vortaro.

Sinjoro J. Lojko el Vilno tradukis en la lingvon Esperanto 50 fablojn de Ezopo; la manuskripto jam estas sendita en la presejon, kaj la verko estos preta kredeble en Julio.

La poŝa lernolibro de nia lingvo por Germanoj jam eliris (Die Weltsprache Esperanto. Vollständiges Lehrbuch nebst 2 Wörterbüchern, nach der russischen Ausgabe von Dr. L. Samenhof herausgegeben von W. H. Trompeter. Preis 20 Pfennige. Commissions-Verlag von Rudolf Uhlig, Leipzig). Sinjoro Trompeter faris ĉion, por ke la libro estu la plej bona. La enhavo estas kunmetita zorge kaj sen preseraroj, la eksterajo eleganta, la papero bona. Ekster la tuta enhavo de la verko No. 41, la libro enhavas en si ankoraŭ surprizon — tre fidele faritan portreton de L. Zamenhof. Ne zorgante, ke la kosto de presado iam povu esti kovritaj, sinjoro T. donis al la libro vendan koston fable malkaran, kaj ekster tio ĉi li ankoraŭ komisiis al sia libristo dissendi grandan nombron da ekzempleroj senpage. Kvankam la fruktoj en la unua tempo kredeble estos tre malriĉaj, tamen la nova libro, disirante en granda amaso, sendube prezentos tre bonan kaj gravan semon por nia afero. Apartajn ekzemplerojn de tiu ĉi libro oni povas ricevi de ni; sed kiu deziras venigi pli grandajn nombrojn, volu sin turni al la libristo Rudolf Uhlig en Leipzig, kiu prenis sur sin la vendadon de la dirita verko.

Korespondadi en la lingvo Esperanto deziras ankoraŭ la sekvantaj personoj:

s-ro Mihail Chruszczov } S. Peterburgo, ulica Zarot-
s-rino Zoja Chruszczov } naja No. 24 kv. 11 (Rusujo).
s-ro Stanislaw Goldberg. Warszawa, Nowolipie 23
(Rusujo).

d-ro D. Marignoni. Crema (Italujo).

Anoncoj.

Nomaro

de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto,
kiuj eliris ĝis Junio 1891.

N ^o	Nomo de l' verko:	Kosto:
1.	D-ro Esperanto. Mejdunarodni Jazik. Predislovie i Polni Učebnik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono rusa)	15 kopekoj
2.	— Jezyk Miedzynarodowy. Przedmowa i Podrecznik Kompletny. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono pola)	15 kop.
3.	— Langue Internationale. Préface et Manuel Complet. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono franca)	20 kop.
4.	— Internationale Sprache. Vorrede und Vollständiges Lehrbuch (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono germana)	20 kop.
5.	R. Geoghegan. Dr. Esperanto's International Language. Introduction and Complete Grammar. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono angla)	20 kop.
6.	D-ro Esperanto. Malgranda vortaro de la lingvo Esperanto (kun antaŭparolo) por Rusoj	3 kop.
7.	— por Poloj	3 kop.
8.	— por Francoj	3 kop.
9.	— por Germanoj	3 kop.
10.	— por Angloj	3 kop.
11.	D-ro Esperanto. Dua Libro de l' Lingvo Internacia (verkita en la lingvo Esperanto)	25 kop.
12.	D-ro Esperanto. Aldono al la Dua Libro de l' Lingvo Internacia (en Esperanto)	10 kop.
13.	Hanez. Safah achath lekulanu (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea)	20 kop.
14.	A. Grabowski. La Neĝa Blavado. Rakonto de Puŝkin (en Esperanto)	15 kop.
15.	L. Einstein. La Lingvo Internacia als beste Lösung des internationalen Weltsprache-Problems. Vorwort, Grammatik und Styl nebst Stammwörter-Verzeichniss nach dem Entwurf des pseudonymen Dr. Esperanto	50 kop.
16.	N. N. Rusa traduko de la „Dua Libro de l' Lingvo Internacia“	25 kop.
17.	D-ro Esperanto. Pleña vortaro rusa-internacia	1 rublo.
18.	N. N. Rusa traduko de la „Aldono al la Dua Libro“	10 kop.
19.	A. Grabowski. La Gefratoj. Komedio de Göthe (en Esperanto)	15 kop.
20.	L. Einstein. Weltsprachliche Zeit- und Streitfragen. Volapük und Lingvo Internacia	25 kop.
21.	D-ro Esperanto. Meza vortaro internacia germana	25 kop.
22.	Henry Phillips, Jr. An Attempt towards an International Language by Dr. Esperanto translated by Henry Phillips Jr., a secretary of the American Philosophical Society. Together with an english-international vocabulary compiled by the translator	50 kop.
23.	Hanez. Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hebrea-germana	20 kop.
24.	G. Henriclundquist. Dr. Esperanto's International Sprak (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono sveda)	20 kop.
25.	A. Demonget. Internacia ou Volapük? par Léopold Einstein, traduction de Auguste Demonget	25 kop.
26.	E. de Wahl. Vortaro Esperanto-hispana	3 kop.
27.	G. Henriclundquist. Vortaro Esperanto sveda	3 kop.
28.	Klubo Nurnberga. La Lingvo Internacia. Vollständiger Lehrgang der internationalen Sprache nebst Wörterbuch zum Gebrauche für Deutsche. Herausgegeben vom Nürnberg-er Weltsprache-Verein	25 kop.
29.	R. Libek. Starptautiska Valoda (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono latva) (Lettisch)	60 kop.
30.	Kolekto da novaj verkoj (en Esperanto), kajero No. 1	25 kop.
31.	Adresaro de la Esperantistoj, kajero No. 1	10 kop.
32.	Marietta Frollo. Vortareto Esperanto-romanana	3 kop.
33.	Chr. Nielsen. Laerebog til det internationale Esperantosprog. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono dana)	25 kop.
34.	M. S. Bogdanov. Pulen učebnik za svetski ut jezik. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bulgara)	50 kop.
35.	Dr. D. Marignoni. Esperanto ossia la piu pratica delle lingue internazionali. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono itala)	25 kop.
36.	J. Rodriguez Huertas. Gramática de la Lingvo Internacia del Doctor Esperanto. (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono hispana)	20 kop.
37.	A. Grabowski. Kondukanto internacia de l' interparolado kun modeloj de leteroj (en Esperanto)	30 kop.
38.	A. Zinovjev. Mejdunarodni jazik „Esperanto“ (la tuta eldono estis senpage dissendita)	
39.	Fr. Vl. Lorenc. Uplna učebnice mezinardni reči dra. Esperanta (Lernolibro de la lingvo Esperanto. Eldono bohema)	25 kop.
40.	D. Gurevič. Sefer hamilim Esperantis (Vortareto hebrea-esperanta)	20 kop.
41.	L. Zamenhof. Vsemirni jazik Esperanto. Polni učebnik s 2 slovarjami (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Rusoj)	10 kop.
42.	Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-internationaler Teil. Meza vortaro germana-internacia	25 kop.
43.	Die Weltsprache Esperanto. Vollständiges Lehrbuch nebst 2 Wörterbüchern (Poŝa lernolibro de la lingvo Esperanto por Germanoj)	10 kop.
44.	A. Grabowski. La Nova Jaro, de Boleslaw Prus. Janko Muzikanto, de H. Sienkiewicz	20 kop.
45.	Ludwig Meier. La Lingvo Internacia Esperanto. Vollständige methodische Grammatik, Formenlehre und Syntax der internationalen Sprache Esperanto	60 kop.
46.	V. V. de Majnov. Renaskita Manfred, dramo en tri aktoj, de K. R.	25 kop.
47.	A. Dombrovski. Lingvo internacia de Dro Esperanto, eldono litova. Mokintuve terptautizkos kalbos Dro Esperanto	15 kop.

Wörterbuch der internationalen Esperanto-Sprache. Deutsch-international.

Meza vortaro germana internacia povas esti ricevata de la
presejo de **W. Tümmel, Nürnberg.**

... Kosto 50 pfenigoj. ...